



## Programo de la turismaj ekskursoj 2016 de lundo 13a de junio ĝis ĵaŭdo 16a de junio

### Lundo : Baugé matene kaj Angers postagmeze

- La kastelo de la "reĝo René de Anĵuo" (1409-1480) en **Baugé** (ekstere), lia onklino estas la patrino de la franca reĝo Karlo la 7a kiu sukcesis fini la "militon de 100 jaroj" kontraŭ la angloj.
- Ni vizitos la tre faman malnovan **apotekon** (1675) de la iama hospitalo **Hôtel Dieu** (1650-2001)
- Posttagmeze ni vizitos la mezepokan kastelon de la urbo **Angers** malantaŭ blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj ; interne oni malkovras la tapetaron pri **Apokalipso** mendita de reĝo Ludoviko la 1a de Anĵuo (avo de René) ĉirkaŭ 1370
- Murtapiŝo « Kanto de la mondo » en la muzeo **Jean Lurçat** en Angers, teksita en Aubusson (urbo de centra Francujo) de 1957 ĝis 1966, ĝi spegulas la tapetaron mezepokan por esprimi kosman vizion pri Homo en Paco kaj Gloro

### Mardo : Plessis-Bourré matene kaj domo de Rabelais kaj Chinon posttameze

- Vizito de la kastelo Plessis-Bourré apud la urbeto Cheffes ; la kastelon dum la 15a jc. konstruigis Jean Bourré, ministro de reĝo Ludoviko la 11a ; la kastelo spegulas la transiron de mezepoko al renesanco, ni vidos nekredoblan plafonon en iama ĉambro de la **alkemiisto** Jean Bourré.

- Ni vizitos la domon "La Devinière" kie naskiĝis la fama verkisto **Rabelais** fine de la 15a jarcento apud Chinon
- kaj fine, ni promenados en la malnova urbo **Chinon**, ni vidos de ekstere la reĝan fortikaĵon kie Johana de Arko renkontis la reĝon Karlo la 7a en 1429

**Merkredo : tuttaga ekskurso al Langeais, Balzac rezidejo, kastelo Azay-le-Rideau** (tagmanĝo en restoracio)

- Ni renkontu la reĝon Karlo la 8a kiu edziniĝis kun Ana de Bretonujo en 1491 en la kastelo **Langeais**
- post manĝo en restoracio "Le Balzac", ni vizitos en la kastelo de Saché (15a-19a jarcentoj) muzeon pri **Balzac** kiu restadis plurfoje en ĝi
- kaj fine ni vizitos la faman kastelon de la urbeto **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj (oni restaŭras la tegmenton kaj murajn skulptaĵojn ĝis 2017)

**Jaŭdo : tuttaga ekskurso al la iama domo de Ronsard, la urbo Amboise kaj la kastelo Chenonceau** (tagmanĝo en restoracio)

- Ni vizitos la ejon "Prieuré de Ronsard" kie loĝis la fama poeto **Ronsard** (1565-1585) apud Tours
- La reĝo Karlo la 8a naskiĝis en la kastelo de la urbo **Amboise**, konstruigis reĝan loĝejon per italaj laboristoj kiam li ekregis en 1491 (komenco de la franca renesanco) kaj mortis tie pro fruntofrapiĝo kontraŭ la supra sojlo de pordo!  
Vi renkontos la lastan reĝon kiu vivis en Luar-kastelo, Francisko la 1a kaj Leonardo Da Vinĉi
- Ni vizitos la domon apud la kastelo de la reĝo kie **Leonardo da Vinci** finis sian vivon(1516-1519), tie situas tre interesa muzeo pri li
- Tagmanĝo en troglodita restoracio en Amboise
- Proksime de Amboise, situas la kastelo **Chenonceau**, nomita la kastelo de la damoj, tie vivis Diana de Poitiers kaj Katarina de Mediĉoj

informoj en <http://gresillon.org/s1>